Esperanto-societo Antaŭen en Tampere, Finnlando



# Surogato Vekilo

2012/1

*De la prezidanto*

## DENOVE ĈE STIRILO

Eble tamen estas tro kuraĝe kaj fiere priskribi mian situacion jene. Ĉiuokaze jen mi denove skribas prezidantan artikolon post 11-jara ”ripozo” kiel ordinara estrarano. Unue mi volas elkore kaj profunde danki al Sylvia Hämäläinen pro ŝia fidela 35-jara laboro kiel sekretario de nia klubo (unue kelkajn jarojn kiel protokola sekretario). Fakte estis ŝia anonco pri retiriĝo, kiu komencis la ŝanĝojn en la estraro. Tamen, la personoj restas samaj, kaj nur la taskoj ŝanĝiĝas.

Nun, dum kelkaj jaroj emerito, mi pensis, ke mi devas doni iom pli da fortoj al nia kara klubo. Ni vidos, kiel tio sukcesos. Tamen mi avertas al vi, karaj geamikoj: ne atendu tro multe. Kiel mi diris dum estrarkunsido: mi ne posedas ian miraklan eliksiron, per kiu ŝanĝi la kluban situacion. Mi ja ĝenerale estas idealisto, kiu kredas je la valoro de Esperanto. Aliflanke mi estas realisto, kiu konscias la faktojn en la nuna mondo. Mi vidas klare, ke la ĝisnuna okupiĝa maniero: membreco kaj laborado en kluboj, almenaŭ estas minacata morti. Tion mi konstatis ne nur ĉe Esperanto. Anstataŭe naskiĝis reta okupiĝo tutmonda. Ĉiu generacio ja trovas siajn metodojn okupiĝi kaj kunlabori. Mi esperas, ke pere de retiĝo tutmonda, Esperanto fariĝos pli uzata lingvo ol iam ajn, kaj tiel iam finfine venkos.

Oni diras, ke la mondo ŝanĝiĝas, kaj ni devas ŝanĝiĝi kun ĝi. Tio eble estas tro granda postulo por sufiĉe aĝaj homoj. Eble estas pli bone diri, ke ni almenaŭ komprenu, ke la mondo ŝanĝiĝas. Por ni, kiuj kutimiĝis al kluboj, kursoj kaj renkontiĝoj, la ŝanĝiĝo povas esti timiga kaj frustraciiga. Ĉu nia multdekjara laboro estis vana? Ne tamen pensu tiel. Dum konstruado oni ja metas ŝtonon sur ŝtono, etaĝon sur etaĝo, kaj ĉiu etaĝo estas egale grava kaj valora por la sekva, se ĝi estas sufiĉe firma. Same kiel oni konstruas, malkonstruas kaj rekonstruas, anstataŭas malnovajn aĵojn per novaj, oni ŝanĝas metodojn por labori, sed la ideoj restas.

Mi deziras al vi ĉiuj, membroj kaj geamikoj-legantoj, bonan jarŝanĝiĝan festotempon kaj bonan novan jaron 2012.

Jukka Laaksonen

# *Terhi Laaksonen trovis interesajn novaĵojn el Tampere.*


***Wolapükiklubi Suomessa.*** *Raumalla on muodostunut wolapükiklubi, kertoo Amonissa Kiinassa ilmaantuwa "The Volapük Herald" numerossaan heinäk. 1 p:ltä 1888.* *Tampereen Sanomat 3.9.1888*

***Wolapük kuolee.*** *Muuan ranskalainen lehti kirjoittaa: Wolapük, josta aiottiin maailmakieltä näkyy joutuvan unhotuksiin. Sen keksijä itse on suuressa määrin tähän syypäänä. Alkujaan aikoi hän kieltä ainoastaan kauppakieleksi, mutta myöhemmin arweli hän sitä woitawan käyttää kirjallisuudessakin, jonka wuoksi hän siihen teki useita muutoksia. Mutta näitäpä ei "Wolapük akatemia" hywäksynytkään. Tämän johdosta syntyi riita, jossa Wolapük on paljon kärsinyt. 20 aikakauskirjasta, jotka yhteen aikaan ilmestyiwät Euroopassa tällä maailmankielellä, owat nyt useimmat kuolleet.*

## *Salutojn el Vekilo numero 1/1982 antaŭ 30 jaroj.*

Tiam okasis en Laborista Banko ekspozicio de Kristnaskaj kaj Novjarajkartoj el ĉirkaŭ mondo. La Vekilo 1/1982 publikigis la okazon. La banko havis bonan kaj grandan ekspozician lokon kaj tiu kostis nenion. La banko ne plu funkcias. Veli

KARTEKSPOZICIO
Nia ekspozicio de modernaj kristnasko - kaj novjarkartoj estis en fino de pasinta jaro. Tie estis kartoj el 40 landoj entute 171 kartoj. Ekspozicion vizitis 500 personoj.
Kune estis ankaŭ kartoj el postlasaĵo de Herman Noponen el 29 landoj, sume 164 kartoj




Afiŝo de la karteksponicio.



Ĉi tie rigardas kartojn kaj mapon de la mondo Jukka kaj Rainer, ili helpis en starigado de la ekspozicio




Ĉi tie estas kartoj el nordaj landoj, el Norvegujo estas unu, ankaŭ el Danlando estas unu Unicef-karto kaj tre bona serio de kristnasko-markoj. Kristnasko-markojn oni ja komencis publikigi en Danlando. El Islando estis multaj kartoj. En la bildo estas kolektanto kaj ”arkitekto" de ekspozicio Veli Hämäläinen.

## *Tapahtumia maailmalla*

10.–11.3.2012 EAF:n Talvipäivät Riihimäellä,
Riihimäen Seurahuone, Hämeenkatu 29.
26.7.2012 Esperanto 125 vuotta.
Juhlavuosi otetaan huomioon koko vuoden.
28.7. – 4.8.2012, 97. esperanton maailmankongressi
Hanoi (Vietnam)

## *Jäsenmaksut ja Esperantolehden tilaus vuodelle 2012*

Vuoden 2012 jäsenmaksut ovat samat kuin vuonna 2011 eli 17 euroa (ja nuorisojäsenet 8 euroa). Esperantolehti vuodelle 2012 on 14 euroa. Tilausmaksu mielellään Antaŭenin tilille **(800011-359984)** jo tammikuussa, jotta lehden tilaus jatkuisi juohevasti. Jos tuet Neston tukirahastoa, laita siitäkin tietoa maksun yhteydessä. – Lisää infoa löydät verkkosivultamme: www.esperanto.fi/tampere/

## *Programo de Antaŭen*

*dum la vintro*
*kaj printempo 2012*

**Januara vespero**
*9.1.2012 je la 17.00*
El *esp.-historio.de Nordaj landoj*

**Februara vespero**
*6.2.2012 je la 17.00*
*Konataj esperantistoj en Esperantujo.*

**JARKUNVENO**
*20.2.2012 klo 17.00*
*Bonvenon partopreni*

**Marta vespero**
*5.3.2012 klo 17.00*
*Prezentiĝas la jara kongeslanto kaj urbo Hanoj.*

**Aprila vespero**
*16.4.2012 klo 17.00*
*Vizitanto.*

**Someraj renkontiĝoj**
*en Metso kafejo,*
*lunde klo 17–18*
*( dum 28.5 – 27.8.)*

**Somera ekskurso**
al terdorso Pyynikki
lunde 4.6. estu je la 17.00
ĉe vidturo de Pyynikki

## *Antaŭenin esperantokerho*

kokoontuu NESTOssa joka toinen keskiviikko
klo 11.30–13.00.
Alkaa 18.1.2012

## *Estraro de Antaŭen 2012*

Jukka Laaksonen, prezidanto
Tapani Aarne, sekretario/kasisto
Sylvia Hämäläinen, vicprezidanto
Lauri Liukkonen, membro
Veli Hämäläinen, membro
Terhi Laaksonen, vicmembro
Marjatta Ström, vicmembro
Markus Sunela, vicmembro
Pentti Järvinen, vicmembro
Anja Karkiainen, agadkontrolandto
Erkki Kemppainen, vicagadkontr.

### *Estraro kunvenas 2012*

6. februaro, je la 18.45.
23. aprilo je la 16.00.

### *Päivystys/Deĵoras en Nesto, Maanantaisin/lunde klo/je la 16-17*

| | | |
|---|---|---|
| 02.01. | Veli Hämäläinen | 050-5240 594 |
| 09.01. | Sylvia Hämäläinen | 050-3214 313 |
| 16.01. | Pentti Järvinen | 050-3382 730 |
| 23.01. | Marjatta Ström | 03-3415 027 |
| 30.01. | Tapani Aarne | 050-5245 823 |
| 06.02. | Lauri Liukkonen | 050-5993 808 |
| 13.02. | Jukka Laaksonen | 03-2554 724 |
| 20.02. | Terhi Laaksonen | 03-2554 724 |
| 27.02. | Veli Hämäläinen | |
| 05.03. | Sylvia Hämäläinen | |
| 12.03. | Pentti Järvinen | |
| 19.03. | Marjatta Ström | |
| 26.03. | Tapani Aarne | |
| 02.04. | Lauri Liukkonen | |
| 16.04. | Terhi Laaksonen | |
| 23.04. | Jukka Laaksonen | |
| 07.05. | Veli Hämäläinen | |
| 14.05. | Sylvia Hämäläinen | |
| 21.05. | Pentti Järvinen | |
| 28.05 | Marjatta Ström | |

ESPERANTO 125 1887-2012

**Antaŭen 90 jara**